

Cirkulero de la Amikoj de Edmond Privat
Claude Gacond, 257-a radioprelego, 1968.09.11 & 14

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni deziras hodiaŭ atentigi niajn geaŭdantojn pri du aferoj.

A.- La Amikoj de Edmond Privat sendis cirkuleran leteron, kiu unue raportas pri la Ĉambro Edmond Privat :

Cl.- « *La Ĉambro Edmond Privat estis oficiale inaŭgurita en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds la 10-an de novembro 1967 en la ĉeesto de la komunumaj kaj kantonaj aŭtoritatoj kaj de la rektoro de la Universitato de Neuchâtel. La libroj kaj valoregaj dokumentoj donacitaj de sinjorino Yvonne Privat estas en ĝi konservataj. Nun la Ĉambro Edmond Privat estas laborloko. Ĝi ne ankoraŭ estas malfermita por la publiko. Oni povas ĝin tamen viziti post rendevua peto.* »

A.- Tiu letero anoncas la jubileon Mahatma Gandhi :

Cl.- « *De oktobro 1968 ĝis oktobro 1969 la tuta mondo festos la centjaran jubileon de la naskiĝo de Mahatma Gandhi. La Fondaĵo Edmond Privat certe estos asociita al tiu festado. Ni vin atentigas pri la nun eldonata **Vivo de Gandhi**. Eldonejo : La Stafeto en La Laguna, Tenerife, Kanariaj Insuloj.* »

A.- Fine tiu letero anoncas alian eldonaĵon. La Amikoj de Edmond Privat bonvolu preni skribilon, por povi noti, kion ni diros :

Cl.- « *La publikaĵo **Revue Neuchâteloise** decidis dediĉi specialan numeron al Edmond Privat. Tiu kajero en formato 24/17 cm enhavos proksimume 64 tekstajn paĝojn, portretojn kaj faksimilojn. Ĝi konsistos el diversaj studoj pri la vivo, verkaro kaj agado de Edmond Privat. En ĝi oni trovos la tekston de multaj leteroj de personecoj, kun kiuj li rilatis : Ernest Naville, Zamenhof, H.-H. Wells, Charles Bally, Romain Rolland, Rabindranath Tagore, Gandhi, ktp. La prezo de tiu speciala numero valoras 6 svisajn frankojn por svisaj mendantoj kaj 6.50 svisajn frankojn (21 stelojn) – sendkostoj kaj esperanta resumaro enkalkulitaj – por eksterlandaj mendantoj. La Amikoj de Edmond Privat en Svislando povas ĝin mendi per aldonita poŝtpagilo. La amikoj en eksterlando povas pagi la sumon de 6.50 svisaj frankoj al la poŝtkonto 20-6841, **Revue neuchâteloise**, Neuchâtel, Svislando. Flugfolio kun esperantaj resumoj de la artikoloj estas aldonita al tiu kajero. Sur via mendilo bonvolu mencii : kun esperanta resumaro. Tiu speciala numero aperos dum septembro 1968.* »

A.- Ni nun ripetas la prezon kaj adreson por la interesatoj :

Cl.- Prezo por eksterlandanoj : 6.50 svisaj frankoj.

A.- 6.50 svisaj frankoj

Cl.- sendendaj al la poŝtkonto: 20-6841

A.- poŝtkonto: 20-6841

Cl.- Revue neuchâteloise. Ni literumas: R-E-V-U-E N-E-U-C-H-A-T-E-L-O-I-S-E

A.- Revue neuchâteloise: R-E-V-U-E N-E-U-C-H-A-T-E-L-O-I-S-E.

Cl.- La urbo estas: Neuchâtel. Ni literumas : N-E-U-C-H-A-T-E-L

A.- Neuchâtel: N-E-U-C-H-A-T-E-L.

Cl.- La lando estas Svislando.

A.- Svislando.

Cirkulero de la Amikoj de Edmond Privat
Claude Gacond, 257-a radioprelego, 1968.09.11 & 14

Cl.- Al la cirkulera letero de la Amikoj de Edmond Privat estas aldonita listo pri la verkoj de Edmond Privat ankoraŭ aĉeteblaj.

A.- En la franca lingvo estas aĉeteblaj :

Cl.- *Aux Indes avec Gandhi*,

A.- *Vie de Gandhi*,

Cl.- *Le Chancelier décapité (Thomas More)*,

A.- *Sagesse de l'Orient*

Cl.- kaj *Trois expériences fédéralistes*.

A.- En la angla lingvo estas aĉeteblaj :

Cl.- *The Clash of loyalties*

A.- kaj *The life of Zamenhof*.

Cl.- Kaj en esperanto estas aĉeteblaj:

A.- *Vivo de Zamenhof*,

Cl.- *Federala sperto*,

A.- *Junaĝa verkaro* kaj

Cl.- *Aventuroj de pioniro*.

A.- Kaj kiel ni ĵus anoncis, estas eldonata *Vivo de Gandhi*.

Cl.- En sia verkaro Edmond Privat disvastigis kelkajn ĉefajn ideojn : la supereco de la neperfortaj luktoj super la perfortaj bataloj, el tio lia amikiĝo kun Gandhi ; la taŭgeco de esperanto kiel internacia lingvo ; la federalismo, kiel solvo al la internaciaj luktoj.

A.- En la movadoj por la Monda Federalismo Edmond Privat estas konata kiel aŭtoro de fundamentaj verkoj kaj prezidanto de la kongresoj okazintaj en Svislando en Montreux en 1947 kaj Ĝenevo en 1950.

Cl.- La deklaro akceptita en Montreux en 1947 restis aktuala :

A.- « Ni, mondfederalistoj, estas konvinkitaj, ke la kreo de Monda Federacio estas la ĉefa problemo de nia epoko. Tiom longe kiam ĝi ne estos solvita, ĉiuj aliaj demandoj – naciaj aŭ internaciaj – restos nesolveblaj. Ne estas inter la libera entrepreno kaj la direktata ekonomio, la kapitalismo kaj la komunismo, ke elekto estas necesa, estas inter la federalismo kaj la imperiismo.

Nur federalismo asekuros la postvicon de la homo.

Ni, mondfederalistoj, asertas, ke la homaro kapablas poreterne liberiĝi de la militado, sed, ke tion ĝi atingos nur per la starigo de Monda Federacio. »

Cl.- Tiun ĉi someron okazis en Interlaken (Svislando) Kongreso por la verkado de Konvencio pri Mond-Konstitucio. Ni partoprenis parton de tiu manifestacio kiel observantoj de la Esperanto-Fako de Radio-Svislando, por ricevi informojn pri la nuna situacio de la movadoj por la Monda Federalismo.

A.- Dum tiu ĉi aŭtuno ni dediĉos nian atenton al la laboroj de la mondfederalistoj.

Cl.- Kiel Edmond Privat, ni pensas, ke federalismo estas unu el la ŝlosiloj al la paco, apud la ŝlosiloj esperanto kaj neperforto aŭ satjagraho. En la verkoj de Edmond Privat esprimiĝas eĉ

Cirkulero de la Amikoj de Edmond Privat
Claude Gacond, 257-a radioprelego, 1968.09.11 & 14

la opinio, ke la pordo al la paco malfermiĝos nur per la samtempa uzo de tiuj tri ŝlosiloj : satjagraho aŭ komplota rezigno al perforto kaj absoluta submetiĝo al la forto de la vero ; federalismo aŭ volo konstrui mondon, kie la homaj rajtoj estas plene agnoskataj ; kaj esperanto.

A.- Ni pensas, ke la esperantistoj devus pli atente studi, kio estas satjagraho kaj federalismo. Kaj la akriĝo de la internaciaj disputoj ŝajnas al ni alvoko entrepreni tiun studon por niaj radio-geaŭdantoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-